WITTERYCK A.J.- (Oostkamp I865-Assebroek I934) Tiu belga pioniro estis unu el la ĉefaj presistoj en Bruĝo de lego- kaj lernolibroj en nederlanda kaj franca lingvo. Konante diversajn lingvojn kaj sin interesante pri instruaj demandoj li aliĝis al Volapük-movado (kaj ĉe laboris super nova int. lingvo) ĝis li ekkonis Esperanton. En I902 li fondis la Bruĝan Grupon, kiun li prezidis ĝis en I920, kiam lin anstataŭis la agema kaj lerta esperantistino F-ino Yvonne Thooris. En I905 li partoprenis la starigon de Belga Ligo Esperantista, kiun li helpis reorganizi post la Ido-skismo en I908 kaj kies vicprezidanto li fariĝis. En I9I2 post la morto de Amatus Vanderbiest-Andelhof, li estis nomita Prezidanto, funkcion kiun li plenumis ĝis I927. Li prezidis la belgajn kongresojn ekde I9I2 ĝis I922 kaj Internacian Esperanto-semajnon en Gento, okaze de la Universala Ekspozicio (I9I3) Li estis Lingva Komitatano ĝis I932.
Witteryck eldonis antaŭ la unua mondmilito ĉiumonatan flandran revuon ilustritan en kiu li rezervis gravan rubrikon al Esperanto. Dum la milito li instruis en Anglujo kaj Holando oficiale Esperanton al la militkaptitoj kaj verkis por tio specialan lernolibron je l'kosto de la belga Ŝta-

to(An Esperanto-conversation book in 4 languages)Li estis honora prezidanto de la Esperantista Grupo de Hastings.

Post la milito li trovis sian presejon detruita, kio kun la malrapideco por lia sendomaĝigo kaŭzis al li la gravan kormalsanon pro kiu li mortis.

Witteryck eldonis i.a. "Esperanto, triumfa solvo de l'problemo de l'I.L. (nederlandlingve); Companion of the English Esperantist", "Esperanto en dek lecionoj (franc- kaj nederlandlingva eldono); (same) "Esperanto en kvin lecionoj" "Kelkaj floroj Esperantaj" (diversaj serioj de ŝercaj legaĵoj) kaj "Kantlibro titolita " "Kantareto", en kiu speciala melodio por "La Espero" verkita de li mem.